LA RONDO.

OKTOBRO 1940. NUMERO 1.

Eldonita de F.R.Banham,

2 Banchory St., Essendon, W5, Aŭstralio.

EL LA REDAKTEJO.

Mi forte esperas, ke ĉi tiu estas la unua numero de informilo, kiu portos intereson, helpon kaj kuraĝigon al Esperantistoj tra la tuta kontinento, en la insuloj, kaj aliloke. En la nuna tempo ĉie aktivas fortoj morte malamikaj al Esperanto, kiel same al ĉiaj idealaj movadoj, Preskaŭ tute forviŝiĝis la organizitaj Esperanto-asocioj kaj grupoj en Eŭropo; individuaj samideanoj kulturas la lingvon nur riske kaj malfacile. La Internacia Esperanto-Ligo registris por jaro je 30-6-40 nur 3987 anojn, kompare kun 8818 por la sama en 1939. En Aŭstralio ankoraŭ ni rajtas organizi kaj kunveni, sed ni sentas tre akre la mankon de internaciaj kontaktoj. Ricevinte dum longaj jaroj eksterlandajn Esperantiskajn gazetojn, ni forte bedaŭras la foreston de la instiga, simpatia kamaradeco kaj solidareco, kiujn enspiradis en nin tiuj frataj komunikiloj. Per novaĵoj el la ankoraŭ restantaj fontoj, kaj per alia materialo, ni penados iomgrade refreĝigi la spiritojn de izoluloj, urbe kaj kampare, kiuj sendube ĝojos vidi atestaĵon de tio, ke ankoraŭ agadas samidealuloj, kiuj ne lasas venki la koron la mondinkubon de teroro kaj milito, sed, male, diligente tenas la simbolan glavon batalpreta, atendante tiun tagon, kiu nepre venos, kiam la demando pri internacia lingvo insiste, postule agitos la penson de renaskiĝinta mondo.

Ĉiun monaton mi esperas verki kvazaŭ "ĉefartikolon", kiu enhavu vortojn de gvido, informo, helpo kaj instigo en nia komuna tasko — gardi kontraŭestingo la karan flameton de vere sankta lumo. Sed ni bezonas ankaŭ VIAJN kunlaboron kaj montrojn de efektiva intereso en nia entrepreno. Tiun intereson vi povas montri, ekzemple per demandoj pri lingvaj malfacilaĵoj, scivolaĵoj pri Esperanto, ĝiaj historio kaj evoluo, aŭ similaj.

Adresu al mi, kiu respondos per "LA RONDO".

F.R.B.

Tiu ĉi revueto, LA RONDO, enhavas informojn pri la Esperanto-movado, lingvajn demandojn, pikajn paragrafojn k. t. p., por via distro aŭ intereso.

"ESPERANTO-INTERNACIA" kaj "BRITISH ESPERANTISTF" devas dee nun aperi nur ĉiun duan monaton, sed en duobla paĝnombro eldoniĝas la due- nomita.

En "Brit. Esp." June/ July, ni ekscias, ke D-ro. Adam Zamenhof estas en malliberejo en Varsovio, sed ke la aliaj membroj de la familio liberiĝis la 8an de Marto, kaj loĝas en la urbo.

SWAHILI, la ESPERANTO de KENJA: Nia membro de BEA, S-ro John Williamson, de C.M.S., Kabete, Kenja, skribas: " En ĉi tiu lando Swahili estas kvazaŭ loka Esperanto. Per ĝi mi instruis lernantojn, kiuj parolis inter si sep lingvojn; kaj foje en Nairobi mi predikas antaŭ du mil Afrikanoj el eble dek kvin triboj. Sed en Eŭropo ŝajne, oni lernas la saĝon malrapide".

En "Unser Kampf" Sir Richard Acland skribas: "It is nice to think that once freed from the sneering advice of the so-called 'practical men', these genuinely practical men would almost inevitably adopt the idealists' solution, and talk to one another in Esperanto" (p. 145, English "Penguin"). Li pritraktas ĉi tie la demandon pri starigo de internacia policarmeo, kiu sendube devus fronti la problemon de intelingvo.

AIR RAIDS PRECAUTIONS. Iu sugestas "Aeratak- rezistaj Prizorgoj",per tio oni povas konservi la komencliterojn A.R.P.

Ekster "The British Esperantist", "Heroldo de Ĉinio, organo de niaj amikoj en Chungking, estas la sola Esperanta presaĵo regule venanta al mi en la nuna tempo. Ĝi enhavas riĉan kaj diversan legaĵon pure pri la orientazia milito kaj ties efiko sur la strukturon de la ĉina socio. La Aŭstralia rep-o estas S-ro Allen Shain, 37 Hopetoun Parade, Box Hill, E 11, kiu vendas ekzemplerojn. Prezo 2p.

ŜPAREMO.

Ni konas homon, kiu, trovinte ĉe sia flanko sian edzinon forpasinta al la anĝeloj, ekkuris al la kuirejo por krii: "Anjo, bonvolu kuiri nur unu ovon ĉi-matene!" Alian, kiu kultivas terpomojn sur la tombejo de sia avino; alian, kiu butonumas la kolumon je veruko sur la kolo, por ŝpari butonon; alian, kiu haltigas la horloĝon, por ke ĝi ne funkciu dum la nokto; alian kiu rigardas super la okulvitroj, por ke li ne eluziĝu. Ili troviĝus en konforma societo kun la homo, kiu monatojn, eĉ jarojn ricevadas gazetojn, kaj je la fina limdato por sendi la abonojn, resendas la lastajn numerojn kun la vortoj: Ne akceptas.

LA DUA PUNIKA MILITO estis lukto inter Hanibalo kaj la Romia popolo. Ĝia rezulto pruvis, ke la bona prudento kaj alta spirito de nacio, kiam ili estas enkorpigitaj en sociaj organizoj kaj manifestataj kun persisto, devas finfine elĉerpi kaj venki la fortojn de unusola direktanta menso, negrave kiom bonega ĉi tiu estu laŭ genio kaj povo. Hare, en Guesses at Truth.

Ni ĉiuj tro inklinas juĝi nin mem laŭ niaj IDEALOJ, sed aliajn homojn laŭ iliaj AGOJ. Harold Nicholson.

La utilo de la poezio konsistas en tio: levi nin super aferojn nurnure utilajn.

ANAGRAMO: Quid est veritas? (Kio estas vero?)
Est vir qui adest. (Ĝi estas la homo antaŭ vi). Johano 18, 38.

TOASTO. Jen toasto al la plej feliĉaj tagoj de mia vivo; nome, tiuj, kiujn mi pasigis inter la brakoj de la edzino de alia viro -- mia patrino.

Strofo por gasteja aŭtograflibro:

Finas tempo de l'libero;
Ĉesas dolĉa ripozdaŭroj;
Al la polva urbinfero
Hom' revenas kun bedaŭro.

HOMA PROGRESO: Ekzistas nenia pli granda mallojaleco kontraŭ la pioniroj de la homa progreso ol nia tro-obstina malcedemo moviĝi eĉ colon for de vidpunkto "unu fojon por ĉiam"akceptita. Inge.

LIBERECO; Ekzistas du liberecoj -- la falsa, laŭ kiu la homo estas libera fari kion li volas; la vera, laŭ kiu la homo estas libera fari kion li morale devas.
Kingsley.

Mia libereco finiĝas ĝuste tie, kie ĝi komencas verŝajnigi sian kapablecon ruinigi miajn najbarojn.
J.S.Mill.

Toleremo estas bona oleo (lubrikaĵo), sed malbona benzino. (antaŭen-iga forto).

Vera eduko do ne konsistas en tio: informi homon pri kio li ne scias; sed en tio: igi lin bona ol li antaŭe estis. Ruskin.

MALOFTAJ EKZEMPLOJ de nenormala uzo de la refleksiva pronomo kiel subjekto de frazo:
(1) "Ili ~~f~~ iris en la vilaĝo, montrante specimenojn de siaj arboj kaj pruvante, ĉiu ke la sia estas la plej bona". (p. 188 "Internacia Lang. Clarke)
(2) ĈIO sia estas plej ĉarma (Proverbaro Esp-a 357)
(3) Sia estas kara pli ol najbara (Proverbaro Esp-a 447, 765.

"Tiel ke" "Tial" so that.
But, as he said no more about the seed, the villagers forgot the matter, so that he could go out of the village in the evening..... Sed ĉar li ne parolis plu pri sia semo, la vilaĝanoj forgesis la aferon; tial li povis eliri el la vilaĝo.....
" I arranged a complete dismemberment of the ideas into independent words, so that the whole language consisted solely of non-changing words." "Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj". Zam. quoted in Plena Vortaro.

SOLVU viajn Esperantajn gramatikajn aŭ alispecajn lingvo-problemojn sendante ilin al Frank Banham. Li klarogos ilin por vi en la venonta "LA RONDO". Jen tri kiujn li ricevis:-
Konfekcio, laŭPlena Vortaro, estas " Vesto, produktata en fabriko laŭ proksimumaj dimensioj, kaj ne laŭ la ĝusta mezuro de ĉiu kliento."
Ŝalti (Ger. schalten (elektr. scienco): Kontaktigi (Angle: to switch on (elec. current)
Hareta kapo: sparsely haired head.

NI INVITAS al legantoj sendi al ni komentojn pri la enhavo di nia revueto. Kion vi pensas pri la asertoj metitaj? Verku mallongajn esprimojn de via sinteno al la ideoj ~~xxxxxxxx~~ elmontritaj, kaj ni eble aperigos ilin. Dankon.

LO RONGO



NOVEMBRO 1940.

NUMERO 2

EDITA DE F.R BANHAM
2 BANCHORY ST. ESSENDON W5. AUSTRALIA

EL LA REDAKTEJO.

Juĝante laŭ la bonvenigaj rimarkoj de el niaj leganto sendube multaj elkore salutos ankaŭ ĉi tiun duan numeron de nia eta organo. Sesdek ekzemplerojn zorge manfaris nia sindona anareto da amikoj en Adelaide, al kiuj mi ka sendube aliaj tre emfaze esprimas dankon. Malgraŭ tio, ke pro trorapide plenumita laboro, sub la urĝo de la kalendaro, aperis en la teksto iom tre da ĝenantaj eraroj, i organeto alportis efikan kuraĝigon kaj utilan ateston, l Esperanto ankoraŭ ni kulturas kaj gardas, atendante la aŭroron de pli hela tempo.

De ekster Aŭstralio ankoraŭ mizeras la novaĵoj pri Esperanta agado. Sed The British Esperantist de Aŭg.-Sep. spiras esperon kaj bravan alfrontiĝon al la ĉiam pli kaj pli minacantaj danĝeroj kaj malfaciloj. La B.E.A., malgr eklipso de Esp-o en preskaŭ tuta Europo, daŭre persistos, dank'al lojala kaj malavara monhelpo flanke de kelkaj. La ĉefartikolo de s-roj Buchanan kaj Long estas defia spito al la kruelaj cirkonstancoj, kaj montras feran spiriton, nevenkeblan animfortikon teni fiere staranta la standardon de nia afero en Britujo.

Aliaj artikoloj substrekas la neceson konstrui jam nun la novan mondon, ne en iu malpreciza dato estonta...teni niajn korojn ekster dipremo, vidante per la imagaj okuloj, kun arda anticipo, la riĉe promesantajn perspektivojn de la postmilita epoko. Ke niaj Anglaj kunbatalantoj tiel efektive jam faras, ni vidas per la kroniko pri larĝe dissemitaj lekcioj donitaj en lernejoj, institutoj, somerlernejoj, preĝejoj kaj similaj tra la lando. Fred Wadham vokas al ĉiu povanta tion, aliĝi kiel delegito de la Internacia Esperanto-Ligo: kontaktu kun Brit. Esp. Ass., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Eng.

El Santiago mi ricevas leteron de s-ro Lanti, konata fondinto de la Sennacieca Asocio Tutmonda, kunlaborinto je la Plena Vortaro, kaj interesa vizitinto al Aŭstralio antaŭ ĉirkaŭ du jaroj. Li forlasis Ĉilion kaj nun (esperinde!) loĝas ĉe s-ro Jesus Amaja, Ap.59, Mexico City.

Aboniĝu amikojn al nia organeto kaj al la traduka kurso; faru la plejeblon! Dankon al ĉiu, kiu jam helpis nin, larĝe, konsile, mone, verke.

Ĝis la Tria!

E.R.Bank[illegible]

INTERŜTATAJ KORESPONDANTOJ.

Ni ricevis belan letereton de Fraŭlino Rose Telfer, fervora samideanino en Adelaide (9 Sherbourne Rd., Medindie Gardens), kiu deziras fondi korespondon kun Esp-oj en aliaj ŝtatoj de Aŭstralio, per kiu ŝi kaj ili reciproke helpu sin en la studado de la lingvo. Pro tio, ke la milito jam plene frakasis ĉian eblon korespondi kun Europaj Esp-istoj, kaj la marvojaĝo al Britujo aŭ Ameriko estas tiel longa kaj necerta , ni opinias, ke tre bone estus: fondi ligeton de skribemaj samidealuloj, kiuj inter si inciti kaj fortigi intereson al nia amata lingvo kaj ardon plimajstriĝi en ĝia uzo.

Sendu adresojn al ĉi tiu organo, kiu enhavos ilin en venonta numero.

KORAN DANKON al "Anon" kaj Sinjoro G. Hillerman, kiuj ĉiu donis kvin ŝilingojn al la kaso de LA RONDO.

NOTOJ POR NIAJ KURSANOJ.

FUSSY. Tiu vorto en Trad. 9 cerbumigis la kompatindajn kursanojn. Neniu duo konsentis pri la ekzakta signifo, kaj ĝi ricevis la jenajn vestojn: Ekscitaj, ekscitiĝemaj, ekscitiĝaj, ekscitiĝegaj, zorgemaj, prizorgemaj, troĝenemaj, precizemaj, precizaj, elektemaj, agitemaj, postulemaj, dorlotemaj. 13!

El Traduko 9.

"I must fly if I am to get back for any lunch."

Mi estas konvinkita, ke la jenaj provoj ne estas internacie bonstilaj:

Mi devas rapidegi, se mi volas ĝustatempe reveni por la tagmanĝo.

Mi.....aŭ mi ne revenos sufiĉe frue por partopreni la tagmanĝon.

Mi kredas, ke oni devas verki simile al la jenaj:

Mi...por ke mi revenóu(alvenu) la hotelon ĝustatempe... aŭ Mi..., alie mi ne alvenos la hotelon.....

La "or" egalas "otherwise" (alie). Vidu Esperantan Biblion ĉe Genezo 30/1:
Donu al mi infanojn, alie mi mortos. Ĉe Apok. 2/5: Faru la unuajn farojn, alie mi venos al vi... kaj 16, Pentu do; alie mi venos al vi...

Ankaŭ el la sama traduko: "I was practically lost when I met you."
Mi preferas: Ĝis la momento en kiu mi renkontis vin, mi ne povis orienti min.
Compare - I thought myself gone when I saw my creditor coming towards me.
I thought myself lost when I met you.

Kiam mi ekvidis mian kreditoron alproksimiĝi ~~mi, mi~~ pensis, ke mi iras en terure embarasan situacion.
Ĝis la momento en kiu mi renkontis vin, mi ne povis orienti min (aŭ, mi opiniis min perdiĝinta).

En la unua kazo la fakto, ke la kreditoro venis al mi, pensigis min, ke mi estas eniranta embarasan situacion, sed la dua estas tute alia.

PAPERMONO.

Money Order --poŝtmandato.
Bank Note--bankbileto, banknoto laŭ "La Revizoro"80/19.
Postal Note -- poŝta monbileto.
Paper Money -- papermono, monpaperoj.
One pound note -- unufunta (bank)bileto.

La Kredo estas simila al la Amo, en tio, ke ĝi ne povas esti devigata. Schopenhauer.
Ĉiu epitafo instruas nin, ke ni devas morti, se ni volas ricevi laŭdon.

(SABATAJ SONORILOJ!?)

En la Batalo de l'Vivo p.6. linio 16 la vorto "sabataj" devus esti "dimanĉaj", ĉar en la Angla originalo staras la adjektivo "Sabbath", t.e., Sunday.

Estas iom stranga por mi tio, ke ĝis nun mi ne legis rimarkigon pri la malĝusta tradukaĵero. Kompreneble estas sciate, ke Zamenhof uzis kiel tekston ian tradukon faritan en la Germana. En tiu verko mi devas kredi, ke la eraro ankaŭ staras, kaj ke Zam. naive, aŭ senpripense, aŭ preter laseme ĝin kopiis. Nun mi ekvidas en p. 40 de Traduko de la Provtekstoj en la Gvidlibro tradukon de Waringhien en la Franca: cloches de samedi, sen kia ajn piednoto montranta sur la eraron.

La vorto Sabbath, certaronde kaj certacele uzata anstat Sunday, havas interesan studflankon. La Puritanoj de la 17a jarc., tre influitaj de la Hebrea teologio kaj religia mentaleco, respektegis la unuan tagon de la semajno, kaj konscie, intence imitis la Hebreojn ankaŭ en tio, ke ili nomis sian plej sanktan tagon Sabato, derive de la Hebrea shabbath: ĉesi faradon; ripozi. Hodiaŭ la vorto estas uzata serioze de

1) Piemaj homoj, kiuj respektegas la unuan tagon kaj ne volas vidi ĝin tago de komercado, amuzo frivola, k. sim., kiuj volas konservi ĝin aparta, solena tago de spirita metitado, edifo. Ĉi tiuj ankaŭ uzas la vorton Sunday en ĉiutaga parolado, aŭ kiam ne necesas emfazi la religian karakteron de la tago.

2) De aŭtoroj, kiuj celas ial solenecon, aŭ poeziecon, aŭ nuancon en kiu restu iom de la diadoro, direspekto, aŭ anima sinteno, kiu karakterizas homojn, kiuj kutime uzas la nomon.

3) Ne serioze de homoj, kiuj en iu okazo volas impresi per ridiga patoso, moketa ŝajnpieco, aŭ ŝajnseriozeco.

Dickens uzis ĝin pro 2), perante redoni la pacan pitoreskon de Angla agrotero en Dimanĉa mateno, kiam la preĝejaj sonoriloj muzikas tra la sunoritaj scenoj de forlasita laboro, vokante al diservo piajn kamparanojn.

La duda Sabbath, komp-e, estas la sepa tago de la semajno; en E-o, sabato.

F.R.B.

LIN/GVAJ DEMANDOJ.
Rimarkoj de FRB.

Pri "SUBJEKTO".

Mi estas iom mirigita, pro tio, ke "Plena Vortaro" difinas "subjekto" per "temo", kiel ĝia unua signifo. Grosjean-Maupin (Dictionnaire Complet Francais-Esperanto) donas sub "sujet": (gram.) subjekto. Millidge donas: (gram., phil.) subject. Ankaŭ la strangan "li estas ĉefurba subjekto" (Revizoro p.40, linio 21) -- he is a town character. Kabe donas: (gram.) Objekto aŭ persono, pri kio oni diras en la frazo. Tial ĉar "temo" estas jam de longe ĝenerale uzata en senco de "subject of an essay, talk", etc., mi rigardas kiel rekte malutilan la uzon de "subjekto" en senco alia ol gramatika aŭ filozofia. Certe mankas al "subjekto" komuna akcepto sence de "temo". Rimarku plue, ke "subject of a curriculum" estas "lernobjekto".

Pri "DESEGNI". To draw, to design, to delineate.

Mankas en Esp-o bona vorto por traduki "to design" en senco "to outline on paper some original conception, artistic or technical, evolved in one's own mind". Ni uzu formulon :

Mi skizas desegnon (make a sketch of a drawing)
Mi desegnas desegnon (draw a drawing)
Mi ? desegnon (design a design)

"En la lernejo mi multon da tempo dediĉis al la desegnado, sed kvankam mi povas sufiĉe lerte skizi (malnete desegni) kaj kopie desegni bildojn, mi tute ne havas kapablon originale desegni, kree superpaperigi formojn aŭ figurojn de el la propra cerbo aŭ spirito."

Ankaŭ la neanglaj-Esperantaj vortaroj ne donas helpon. Ĉiu difinas simile al la Anglaj. Ekzemple G. Muster-Zeichner (model- aŭ specimendesegnisto). Laŭ Millidge, "draughtsman" estas "industria desegnisto". Mi fine opinias, ke ne havante apartan vorton por "designer" ni uzu aŭ "plandesegnisto" aŭ bone elektitan adverbon aŭ adjektivon : profesia, originala desegnisto, li originale (aŭ, kree) desegnis la planon.

LA RONDO.

EL LA REDAKTEJO.

"LA RONDO" estis fondita ĉefe kiel informbulteno kaj suplemento al la tradukaj folioj. Tial ĝi ĝis nun plejparte havis novajan aŭ prilingvan karakteron. Eble ĉi lasta estis iom subtileca aŭ ne tre interesa por nekursanoj aŭ negramatikuloj. De nun, ni penos variigi la enhavon, celante per tio logi homojn, kiuj preferas simplajn skizojn, anekdotojn, rakontetojn kaj similajn. Ni petas kunlaboron de legantoj en tiu tasko kompili numerojn kun diverstema konsisto. Novaĵoj alilandaj venas nur malofte pro konataj cirkonstancoj, kaj aperas nur en ĉiu dumonato "The British Esperantist."

LA TRADUKA RONDO. Pro la malfacilo de la reprodukta procedo, niaj amikoj-fabrikantoj en Adelaide devas tute remaŝinskribi kaj prepari gelatenon por ĉiu 25-o da folioj. Ni celas do limigi la membrojn je 25 metodemaj regulobservantaj, studemaj lernantoj, kiuj zorge kulturos la legadon kaj komparadon de klasikaj verkaĵoj Esperantaj, kaj efektive, honeste dediĉos tempon kaj cerbostreĉon al la progresado en la arto traduki. La kurso estas destinata nur por ~~tiu~~ tiuj relative malmultaj, havantaj en si ĝermojn de tradukista talento, kiuj finfine evoluiĝos en praktikantan eliton, en kies manoj kuŝos la honora respondeco daŭrigi la tradicion de nia estiminda literaturo. Ne gravas la nombro; treege gravas la kvalito. Kelkaj el niaj plej bonaj tradukistoj (kaj originalaj verkistoj) povosciis neniun lingvon ekster la patra kaj Esperanto. For la diletantismo! Pli da vera sindonemeco al nia afero! Mi bedaŭras la malmultiĝon de tradukitaĵoj venantaj al mi. La plimulto el la membroj jam kontentiĝas nur ricevadi la foliojn, sen eĉ peneto fari la laboron. Ĉu ili almenaŭ konservas en libro kaj detale studlegadas la ricevitajn tekstojn? Mi dubas. La venanta jaro vidu nin anaro da fidele laborantaj kaj decidemaj tradukantoj, kiuj havas sub mano la bazajn vortarojn kaj gramatikojn, uzatajn ĝis forfrotiteco. Sciante tion, nia brava amikaro en Sud-Aŭstralio ĉerpos freŝan instigon por sia fortonpostulanta klopodado produktadi la foliojn.

"LA RONDO" jam eldoniĝas 60 ekzemplere.

Ĝis la kvara!

F.R.B.

PRI VIRINA PSIĤO.

La kredaĵo el mezepoko, nome, ke la pliparto de la virinoj estas diabloj, estas nur infanmensa. Moderna Sta. Antono ricevus mokridon kune kun konsilo, preni al si edzinon, por ke li kondutu kiel prudenta homo. La virinoj estas nek pli bonaj nek pli malbonaj ol la viroj. Troviĝas en ambaŭ seksoj ja fort- kaj malfortkarakteraj, nepasiiĝaj kaj emaj al pasiondoj, bonmoraj kaj malĉastaj ktp. La diferenco inter la du seksoj nur estas tiuj, kiuj helpas al la daŭra ekzistado de la homa speco. Kontrastate kun la vircj, la virinoj estas pli emociemaj, kaj iliaj emocioj moviĝas

pli supraĵe de iliaj naturoj, iliaj korsentoj estas pli facile tuŝitaj je vido al la sufero. Ili estas pli amemaj kaj restas pli konstante en siaj amoj. Ĉiuj tiuj nomitaj kvalitoj bone efikas sur la vivi-eltenadon de iliaj infanoj. La virinoj estas tute tiel honestaj kaj veremaj, kiel la viroj, krom tiam, kiam ili deviĝas ruzi pro sia malsupera korpoforto. Ĉe ĉiuj seksrilatoj ilia intuicio estas pli vigla ol la vira. La amo kaj pasio estas en ili almenaŭ tiel fortaj, kiel en la viroj, sed tiuj sentoj ne tiel facile flamiĝas, kaj jam florantaj ili daŭras ne tre longe kaj nur intertempoj de senardo. Moderaj fiereco je korpaspekto kaj emo sinornami estas tute laŭnaturaj ĉe la virinoj ĉar tio faras ilin pli allogaj, kaj tial havigas al ili pli vastan elektokampon rilate al estonta edzo. Ke virino serĉadu laŭplane sian tutvivantan estas same dece kaj rajte, kiel estas, ke la viro amindumi, volante edzinon.

Tiuj patrinoj, helpantaj siajn filinojn en tiu rilato, faras la plej altan patrinon devon. Malestimeginda patrino estas tiu, kiu, malfidela al sia sankta devo, nur pro la bonhavo de iu riĉulo vendas la filinon en efektivan prostituecon, vualitan de la nomo de edzineco, al viro, pri kiu neeble estas, ke la filino lin amu.

---------- J.I.PARSONS.
Trad. ROBO.

ĈU MANKAS AL IU KURSANO FOLIOJ DE LA KURSO? Se jes, nepre informu min. F.R.B.

ALIEPOKA FRATO.

Miriga fakto ĵus trafis mian konon, skribis kontribuanto al la Londona "Evening Standard."

Antaŭ kelkaj tagoj viro 92-jaraĝa estis venigita kiel atestanto antaŭ Berlinon kortumon. Demandite pri sia familio, li respondis, ke li havas fraton, kiu mortis jam tre longan tempon.

"Kiun jaron li mortis?" demandis la juĝisto.

"En 1793" venis la respondo.

"En 1793?!" frapite eĥis la juĝisto, "Nepre vi volas diri 1893, ĉu ne?"

Sed la maljunulo rejesis, ke vera estas tio, kion li per dokumento tuj pruvis.

Lia patro, naskita en 1774, edziĝis kiam 19-jara. Lia unua infano, filo, naskiĝis en 1793, sed mortis post du semajnoj. La patro reedziĝis, estante 63-jara, tio estas, en 1837. Lia dua filo naskiĝis en 1838. Kiam do tiu ĉi aperis antaŭ la Berlina kortumo lia "pliaĝa" frato jam kuŝis entombe pli ol 137 jarojn!

Supozine ĉi tio estas rekordo! El la SUDA KRUCO.
Feb. 1932.

Novaj abonantoj al nia organo estas s-ro Enderby, Wellington N.S.W., malnova batalanto por nia afero kaj firma amiko de tiuj fuĝintaj la eŭropan teroron. Fraŭlino Telfer, fervora studantino en Adelaide. Fraŭlino Cox, Surrey Hills, Vic., longserva sekretarino de la iama Melb. Esp. Societo, s-ro Stan Porter, Yetholme ~~ap~~ apud Bathurst, fidela izolulo. S-ro J.King, Lithgow. Pastro W. Rymer, malnova E-isto. Ankaŭ donaco 1/6 de s-ro Enderby. Dankon!

Du neparaj gantoj ne faras unu paron.
Du duonveroj ne faras unu veron.

ETERNECO.

Iam kaj iam ni rimarkas en literaturo kaj oratorajo klopodojn de homoj, kiuj streĉas la cerbon, dezirante transdoni al la legantoj aŭ aŭskultantoj kiom eble plej fortajn impresojn pri la animprema konsepto de la tempa senfineco, la eterneco. Multaj sentas ion komikecan en la vortoj de D-ro Pastro Talmage: "Ho, kia ĝuego staradi mil jarojn, aŭskultante al la ensorĉe ĉarma harmonio de l'ĉielo, kayposte ekscii, ke la harpistoj nur estis agordantaj siajn harpojn!"

Pri tio amiko Joab Eljot komentis:

Per senĉesa Di-adoro
Raŭkiĝus eĉ la Dia ĥoro.

El himnolibro presita en Kolonjo en 1625j, mi tradukis la jenajn ilustrojn ~~en kelkaj~~:-

Eterno, ho eterno!
Kiom longa vi, eterno!
Se eta birdo portus for
Grajneton nur de nia ter'
Nur unu grajnon en miljar'
Ankoraŭ starus vi, sed tero ne.

Eterno, ho eterno!
Kiom longa vi, eterno!
Se en vin, ĉiun milan jaron,
Okul' al larmo lasus falon,
Se per tio ter' troplenus;
Eĉ tiam vi ade daŭrus!

---------- F.R.B.

RESPONDO AL DEMANDO.

"Wishful think ing" estas esprimo nun tro ofte uzata, do banalaĉa, sed ni devas iam traduki ĝin. Ĉu ne "prodezira penso", "rezonado laŭ propraj deziroj". Konserne la rimarkindan esprimon "a pious wish", ankaŭ la Germanoj uzas tiun formon "ein frommer Wunsch" (an innocent, i.e. vain, wish; desideratum). Tial mi sugestus, ke oni difinu ĝin per "dezirindaĵo", aŭ deziratajo, pri kiu oni nur malofte esperas, ke ĝi estas (os) havebla", laŭ kunteksto.

PROVOJ AL ĜUSTA TERMINOLOGIO.

Infanetzorgejo -- creche.
Infanlernejo -- kindergarten.
Ŝtata popollernejo -- elementa lernejo -- State (England, Council) school.
Altlernejo, liceo -- high (secondary) school.
Gimnazio -- public (grammar) school; first-grade school preparatory to university.
Kolegio -- College, one of several forming a university (the colleges of Oxford); a superior, upper school.
Instituto por instruistoj -- teachers' training college, normal school. (Ne uzu "normala lernejo", francismon.)
Tekniks, metia lernejo -- Technical school.
Commercial School -- Komerca lernejo; lernejo por oficejistoj.
Reala lernejo (Tiu ĉi nomo estas dubesenca. Millidge: "a modern school "(of practical subjects, technics &c.). Grosjean-Maupin: "ecole d'enseignement moderne, ecole professionnelle, ecole primaire superieure". Zamenhof, en Letero al Borovko (tradukita V. Gernet) uzis "kiam el la Bjelostoka reala lernejo mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion", sed ekzistas dubo pri dirvolo.

Jen sendube malfacile solvebla demando en Esperanto, ĝuste pro la diverslingvaj signifoj de vortoj malstrikte uzataj internacie. Ekzemple, la germanoj per "Hochschule" (alta lernejo) signifas "academy", "university", "college", per "lycee" la francoj celas "(ŝtata) gimnazio", aŭ "liceo", kiu lasta siavice estas difinita de Plena Vortaro per "mezgrada lernejo" kaj "gimnazio"! Ni kore bonvenigus helpon de instrufakuloj en ĉi tiu afero.